

bulteno de la Asocio de Verduloj Esperantistaj,

Julio 1993

Karaj AVEanoj,

kiu de Vi legas VERDire, tiu eble trovis en ĝi noton pri la malapero de AVE de la ĝisnuna sekretario Jean-Claude Thumerelle. Tio eĉ ne estis miriga, ĉar AVE kaj la AVEanoj tre malregule "laboras". Dank al Claude Rouget ni havas VERDire kaj pere de tio tre bonan inform-jurnalon pri ekologia politiko. Do, AVENO nek necesas esti regula, nek faka.

Tamen mi sentis la bezonon, teni AVE vivanta ĉar tio asocio estas reto inter tiuj Esperantistoj, kiuj laboras ene de iu ajn Verda partio. Kvankam mi ne pretervidas, ke VERDire aperigas legant-leterojn kaj tiel ankaŭ estas reto.

Mi dufoje spertis kunsidojn enkadre de Eŭropa Kongreso de la Verduloj kaj tie ni povis kunsidi por pli bone konatiĝi kun aliaj AVE-anoj kaj montri al la ne-esperantistaj Verduloj, ke nia Internacia Lingvo funkcias. Tiu lasta punkto estas la dua grava por la ekzisto de AVE.

La tria punkto estas la signalo al UEA, ke Verda politiko pluekzistas ene de Esperanto.

AVE havas nun iom pli ol 100 membroj. La financa afero ĉimomente ne gravas, ĉar mi ricevos helpon (parton de la sendokostoj) de "mia" Membro de Eŭropa Parlamento, Wilfried Telkämper (GRÜNE); kaj la kopiojn mi povas pagi mem.

### Deklaracio de Parizo

*Tiu deklaro estas de GRAEL (Verda Alternativa Eŭropa Ligo) de 1984 de la tiama Verda Frakcio de la Eŭropa Parlamento.*

*Bedaŭrinde ĝi jam estas iomete aĝa - sed mi ne disponas pri pli nova mallonga teksto de la nuna Verda frakcio. Tamen mi opinias, ke pri tiu teksto ekzistas konsento ankaŭ inter ni.*

Nia komuna promesdevigo survoje al nova, neŭtrala, malcentrala Eŭropo de mem-mastrumaj regionoj, ĉiuj konservantaj sian propran individuecon, baziĝas sur la sekvantaj punktoj:

\*Ni estas kontraŭ la disvolvo de nukleaj armiloj en Orienta kaj Okcidenta Eŭropo.

Ni estas por la kompleta malarmado kaj malfondo de militaj kaj potencaj blokoj.

\*Ni estas por senkompromisa politiko rilate al la medio, por ke savi la ekologian ekvilibron.

Ni estas kontraŭ la poluado de la aero, akvo kaj grundo.

Ni estas kontraŭ la detruo de la naturo kaj pejzaŝo fare de malkonsidera urbanizado.

\*Ni estas por samaj rajtoj de la virinoj en ĉiuj kampoj de la socio.

\*Politiko rilate al la Tria Mondo devas baziĝi sur pozicio de sama nivelo kun la homoj de la Tria Mondo. Ni estas por la reorganizo de la ekonomiaj rilatoj inter Eŭropo kaj la Tria Mondo kaj por pli proksima kooperado inter eŭropaj solidarec-movadoj kaj la movadoj de la Tria Mondo.

\*Ni estas por libera ekzercado de fundamentaj civitan-rajtoj, kiel unu de la plej gravaj antaŭkondiĉoj de emancipita socio kiu gardas kaj protektas la ekologian ekvilibron.

\*Ni estas por ekologia agrikulturo. Tiu inkluzivas la daŭrigon de malgrandaj kaj mezgrandaj bienoj.

### Apogo de Elektro de la Suno

La urbo Freiburg/Breisgau (Frajburg) apogas la investon en la fotovoltikon pere de speciala tarifo. La unua paŝo al tiu estis 1992 la mocio de Verda parlamentano en Baden-Virtemberg, D-ro Walter Witzel (Wicel), kiu postulis pli altan pagon ol laŭleĝe - nome 2 gmk-oj po kWh - da elektra energio gajnita rekte de la suno - ĉirkaŭ la dekobla de la aktuala prezo por 1 kWh.

Li argumentis, ke la anstataŭo de elektra energio el fosiliaj fontoj plibonigus la aeron kaj agus kontraŭ la CO<sub>2</sub> forcejo-problemo. Kalkuloj de la Fraunhofer Instituto por Solara Energio montris, ke amortizo laŭ ekologia vidpunkto (energio kaj medio-uzado) estos ene de malpli ol dek jaroj.

Tiun postulon la ministro por ekonomio, D-ro Spöri, SPD, (Speŭri), ne volis transpreni. Li tute ne respondis pri la ekologia argumento, sed nur pri laŭleĝaj kaj ekonomiaj.

Intertempe la FEW (Frajburga Elektro Uzino (aŭ fabriko)) transprenis parton de la postulo de Wicel. Ili donas unue favoran monpruntaĵon por dek jaroj, due ili pagas la laŭtarifan prezon de 0,16 gmk-oj po unu kWh kaj special ili pagas tarifon de 2 gmk-oj po unu kWh dum 4 horoj ĝis tagmezo, tempo de la tielnomata elektropinto - do, kiam la plej granda povumo estas bezonata. Laŭ informo de la 8-a de junio 1993 FEW antaŭvidas por ĉi tiun jaron instaladon de povumo de 50 kW je ĉirkaŭ 30 domoj.

### Rubo-Brulado

Eble la teĥnika proceso de Thermoselect estas fama jam en aliaj landoj. Ili ja promesas, ke ne plu ekzistus problemoj rilate al la brulado de ĉiu ajn rubo. Vere, tiu proceso sekvas la konatan pirolizon, sed kun brulado pere de pura oksigeno. Tiu lasta reduktas la aer-rubon kaj plifaciligas la purigadon de la elfluanta gaso.

La firmao havas uzinon ĉe Verbania ĉe la itala Lago Maggiore (Maĝore) kaj ili varbas ege por sia procedo. Ĉar en Germanio la brulado de rubaĵo ne estas ĝenerale akceptita ili trovas grandan merkaton se ili sukcesus. Bedaŭrinde la procedo de tiu firmao estas iom sekreta kaj ili ofendis la leĝon diversflanke, ke itala medio-grupo, gvidata de D-rino Alberti, akuzis ilin.

Estus interesa scii, ĉu ili ankaŭ varbegas en aliaj landoj ?

### Demandoj

Vi ricevis ĉi tiun AVENO-n 7; tio signifas ke Vi estis en la adresaro kiun mi ricevis de Christopher Fettes. Pri tio adresaro mi havas kelkajn "komencajn" demandojn.

-Unue, bv. sendi al mi (Manfred Westermayer, vidu sube) leteron aŭ poŝtkarton kun **Via kompleta adreso** (laŭ la kutimo en Via lando) se Vi volas resti membro de AVE.

-Due, mi havas demandon pri ebla **interŝanĝo de niaj adresoj** (do, pri adres-listo). Se Vi estas por interŝanĝo bv. skribi tion; la interŝanĝemuloj ricevos liston de la aliaj interŝanĝemuloj.

-Trie, mi opinias, ke ni antaŭ la venontjara **baloto por la EP** skribu baldaŭ leterojn (pri uzeblo de Esperanto) al niaj Verdaj partioj, speciale al la kandidatoj kaj al subgrupoj de la partioj kiuj pritraktas internaciajn aferojn.

Pri tio necesas leteroj en la koncerna lingvo. Se Vi estas preta skribi taŭgan - certe ne tro longan - tekston, bv. skribi Vian opinion (aŭ tuj almeti tekston). Mi estas preta forsendi ilin al la Verda Frakcio de la EP (se mi dubas pri la enhavo mi provos konsulti alian samlandanon).

Pri la partioj ekster EK bv. trovi mem taŭgajn homojn en Verdaj politikaj partioj aŭ grupoj kaj kontakti ilin.

Bonvolu respondi al la (provizora) sekretario:

Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen